

Martin Luther,
De la ĉielo venas mi

tradukita de Manfredo Ratislavo

1.) “De la ĉielo venas mi,
rakonti volas mi al vi
pri ege bona, nova aĵ’;
jen estas mia raportaj’.

2.) Hodiaŭ naskis virgulin’
infanon, kiu savos vin.
ĝi estas fil’ de nia Di’,
ĝojeju vi pro tiu ĉi!

3.) ĝi estas Kristo, nia Di’,
el la mizer’ vin gvidos Li.
Li volas esti la Savant’,
de viaj pekoj purigant’.

4.) Alportas feliĉegon ĝi
al vi de l’ patro, nia Di’,
ke vivu vi en la ĉiel’
kun ni en la eterna hel’.

5.) La signon memorigu vi:
En stala trogo kuŝas ĝi,
troviĝas tie la infan’,
tenanta ĉion en la man’.”

6.) Eniru ĝoje ĉiuj ni
kun la paŝistoj tien ĉi,
por vidi, kion donis Di’
per Sia filo nun al ni.

7.) Atentu vi, ho mia kor’,
rigardu tiun en ador’.
Jen kuŝas nude en troget’
la ege kara Jesuet’.

8.) Jesu’, mi bonvenigas Vin,
ĉar Vi ne malakceptas min,
vizitas mizerulon min;
aĥ, kiel mi nur danku Vin.

...

Martin Luther,
El alta ĉielo

tradukita de Joachim Gießner

1. El alta ĉielo portas mi
novaĵon bonan jen al vi.
Pri dibonec’ kaj difavor’
kantadas nun l’angela ĥor’.

2. Infan’ naskita ja por vi
de virgulin’ pro grac’ de Di’.
Kaj delikate li sen fin’
ĝojigu amoplene vin.

3. Li estas Kristo, la Sinjor’,
kondukos mondon el dolor’.
Savanto estos li por vi,
purigos vin de l’pekoj li.

4.
.....
.....
.....

5.
.....
.....
.....

6. Ni laŭdu lin per ĝoja son’
kaj iru al la dia don’.
Kun la paŝistoj vidu ni
la filon, kiun sendis Di’.

7.
.....
.....
.....

8.
.....
.....
.....

...

- | | |
|--|---|
| 9.) Sinjor', de ĉiu aĵ' kreul',
aĥ, kia iĝis Vi etul'!
Vi kuŝas sur la fojno jen,
de kiu manĝis la azen'! | 9.
.....
.....
..... |
| 10.) Se estus tiu mondo pli
grandega ol nun estas ĝi,
malvastus tamen ĝi por Vi,
samkiel tiu trogo ĉi! | 10.
.....
.....
..... |
| 11.) Ne per silkvesto kaj velur',
vestita eatas vi ja nur
per vindaĵoj; sed en tiuj ĉi
aspektas kiel reĝo Vi. | 11.
.....
.....
..... |
| 12.) Plaĉinta estas ja al Vi,
elmontri tiel nun al ni,
ke antaŭ vi de l' mondo or'
ja estas tute sen valor'. | 12.
.....
.....
..... |
| 13.) Ho, mia kara Jesuet',
farita estu la litet'
por Vi en mia kora ŝrank';
mi ne forgesu vin pro dank'. | 13.
.....
.....
..... |
| 14.) Pro tio ĝoje saltu mi
kaj kantu laŭ la melodi'
de laŭdokant al Via glori',
ho mia kara Di-Sinjor'! | 14.
.....
.....
..... |
| 15.) Honor' kaj laŭd' al nia Di',
ĉar Sian filon donis Li
al ni surtera la homar'.
Ni ĝoju kun la anĝelar'! | 15. Al Dio glori', honor' kaj grati'
pro lia fili', ĉieldonac'.
L'anĝeloj ĝoje kantas nun
pri estonteco kaj fortun'. |
| ... | ... |

*Traduko de la Germana poemo “Vom Himmel hoch, da komm ich her” de MARTIN LUTHER (*1483 – †1546) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-483-940 (2008-12-27 15:47:22)

En la katolika preĝo- kaj kantlibro de la episkopejo Monastero/Vestfalia (MÜNSTER / WESTFALEN), Germanujo, estas antaŭmetita kiel la unua strofo enkonduka strofo, kiu klarigas, ke la sekvaj kvin strofoj estas la parolo de la anĝelo, kiu anoncas al la paŝtistoj la naskiĝon de Jesuo. Jen la Esperantigo de tiu enkonduka strofo:

*0.) Jen venis kun miriga klar’
anĝelo al la paŝtistar’;
sendita estis li de Di’
kaj jenajn vortojn diris li:*

*Traduko de la Germana poemo “Vom Himmel hoch, da komm ich her” de MARTIN LUTHER (*1483 – †1546) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-483-1241 (2012-10-18 10:43:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.